

Karikaturo de Julio Baghy, el *Svisa Espero*, oktobro 1969

Claude Gacond, 327-a radioprelego, 1970.14.07 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pasintan semajnon ni raportis pri la aŭd-vidaj prelegoj por komencantoj, kiujn ni pretigas. Ni vidis, ke la celo de tiuj prelegoj estas permesi la organizon de kunvenoj por komencantoj ekster la grupaj kunvenoj.

A.- Tiel la problemo de la asimilado de la komencantoj estos parte solvita. Ni pretigas 30 aŭd-vidajn prelegojn, tio signifas, ke la komencantoj havos je sia dispono 30 vesperojn. Se oni observas la ritmon de unu prelego ĉiumonate, oni havos programon por proksimume tri jaroj.

Cl.- Post tiuj tri jaroj, aŭ antaŭe, tio dependas de la talento de la komencantoj, la novaj esperantistoj povos ekviziti la grupajn kunvenojn.

A.- Sed la nivelo de tiuj kunvenoj devas esti pli alta ol tiu de la aŭd-vidajn prelegoj por komencantoj. Tio ne ĉiam estas. Tion jam kritikis Julio Baghy en siaj karikaturaj.

Cl.- En la celo malfermi diskuton pri la problemoj, kiuj devas esti solvitaj en la svisaj grupoj, ni komencis publikigi tiujn karikaturajn en nia gazeto *Svisa Espero*.

A.- De tempo al tempo ni legos al vi parton de tiuj karikaturaj. Skribante al Radio-Svislando vi povos peti la numeron de *Svisa Espero*, kie troviĝas tiu karikaturo.

Cl.- Hodiaŭ ni vizitas interesan grupon. Aŭdu :

A.- « Mi staras antaŭ la pordo de BES (Bagonia Esperantista Societo). Antaŭ ol paŝi en la lokan sanktejon de la tutmonda kulturmovado mi subaŭskultas la misteran – **silenton**. Kiel ? Jam estas la fiksita horo de la komitat-kunsido. Ĉu mi estus la unua ? Eraro. La pordisto informas min pri la ĉeesto de juna gesamideana paro, alveninta antaŭ duonhoro. Verŝajne ili praktikas interne la « **internan ideon** ». Do ne malutilas ŝajnigi gorĝkataron. Bonvole mi tusetas ĉe la sojlo.

Cl.- Kaŝanhara junulo kaj blonda ĉarmulino modestadas en la ĉambro. Li sidas ĉe la tablo kaj tenas en la mano gazeton – renversita ; ŝi staras fore de li kaj atente ĝuas la artajn konturojn de la Verda Stelo, pendigita sur la muron. Ili silentas. Nur la frizuroj, ardantaj vangoj kaj unu kravato elokventas. Li salte leviĝas kaj tro laŭte salutas min. Ŝi nur perkape esprimas sian bondeziron. Mia koro ridetas. Estas ja majo. Sed mia buŝo ne perfidas ; ĝi pritraktas la problemon de la « **kvanto kaj kvalito** ». Ili embarase silentas. Eĉ unu esperanta vorto ne forlasas iliajn lipojn. Mi penas liberigi ilin de embaraso kaj pliproksimigi ilin unu al alia. Tiel disigite ili aspektas gemalamikoj. Kaj mi sentas mian kulpon. Kompreneble mi sukcesas, ĉar tiun sukceson ili mem pleje deziras. Intertempe sugeste rigardante al la junulo mi aranĝe tuŝas du-trifoje mian kravaton. Fine li komprenas kaj forigas la postsignon de la « kunsido » rearanĝante diskrete sian kravaton. Vira solidareco petolas danke el lia rigardo al mi...

A.- ... kaj ni trioje sidas sur la kanapo...

Cl.- kaj ni atendas... atendas.

A.- Fine kvaronhoron post la fiksita tempo alvenas tri gravmienaj sinjoroj : du komitatanoj kaj la kasisto. Babilado en « nia kara lingvo », sed nur modere kaj laŭeble kun multaj gramatikaj eraroj, poste

Cl.- ... poste atendo, atendo.

A.- Nu, fine alvenis ankaŭ la sinjoro sekretario kun fremdlanda gasto. Pro la malfruo li estus preta senkulpigi sin, sed vidante la mankon de la prezidanto li amindume komplimentas al la ĉarmulino. Pasas minutoj, sed fine venas **li** : la prezidanto.

Cl.- La « Bonan vesperon » ĥore-kore sonas. La sinjoro embarasite ridetas kaj respondas – nacilingve...

A.- Nu, la sinjoro prezidanto eksidas, elpoŝigas sian horloĝon, metas ĝin sur la tablon kaj definitive ekzilas Esperanton li malfermas la nacilingvan kunsidon de BES. Ĉe la tablo rolas : la Prezidanto, Sekretario, Kasisto, I-a kaj II-a Komitatanoj. Honorloke, sed iom fore de la tablo la fremdlanda mondvojaĝanto silente digestas. Li ŝajnas grandan atenton al la nekomprenebla lingvo. La popolo, premante sin unu al alia modestadas sur la angula kanapo : la du geamideanoj kaj mi.

Cl.- Nun sekvas protokola ekstrakto, eble iom kurba, sed pli fidele respegulanta la realecon ol la oficiala protokolo mem.

A.- Prezidanto (per dekminuta enkonduko klopodas konvinki ĉeestantojn, ke Esperanto estas necesa kulturfaktoro) : ... kaj tamen... ĉar... kvankam... vidu, gesinjoroj, sekve... jes !... ne !... la nekredeble skeptike neas...

Cl.- Komitatanoj (entuziasme aplaudas) : Prave ! Prave !

A.- Fremdlandano (konvinkite de la nekomprenebla parolo) : Vivu ! Esperanto progresas. (Li ĝentile aplaudas.)

Cl.- Prezidanto (indulge ridetas kaj perkape dankas la aprobon) : ... ĉar... kvankam... tamen... sekve... jes... ne... mi proponas la eldonon de propaganda libreto, nu, kiel mi esprimu, jes, mi pensas pri eta libro, kajereto, oportune klariganta ĉion pri la lingvo al la publiko... en cent mil ekzempleroj... kvankam... tamen... sekve la titolo estus *Katekismo de Esperanto*.

A.- Komitatanoj (forte aplaudas) : Grave ! Grave !

Cl.- Kasisto (gravmiene) : Si-si-sinjoroj, la ka-ka-kkaso estas ma-malpl-pl-plena. La la la propagandan pr-pr-prrrrovizo estas re-re-rezervita po-po-por aaaalia celo. Nur ĉ-ĉ-ĉe la fi-fino de la ja-a-ro ni po-po-povos tu-tu-uŝi ĝ-ĝ-ĝin. Nun e-e-estas nur Ma-Ma-Majo. (Kaj ĉion en nacia lingvo ! Prezentu al vi, kiel flue li balbutas en Esperanto !)

A.- Fremdlandano (ĝentile turnas sin al la apuda sidanto kaj gratulas) : Vere, tre interesan muzikon de l' parolo havas via lingvo.

Cl.- Sekretario (raportas) : ... kaj fine mi ĝoje sciigas, ke la nombro de nia membraro konstante kreskas. Dum la lasta kvaronjaro aliĝis kvar novaj membroj el la dek kursoj, aranĝitaj de nia landa societo. Entute ni havas 57 membrojn, el kiuj 7 eĉ pagis la kotizon...

A.- Komitatano (leviĝas, Napoleon-miene ĉirkaŭrigardas kaj patose gestadas dum la balatona parolado) : Sinjoroj, la danĝero frapas sur la pordo ! La reorganizo gravas. Ĉu UEA aŭ UFE ? UEA kaj UFE batalas, kiel iam IKUE kaj IKA. Ĉu nia BES neglektu la problemon ? ICoKo jam alvokis nin. Sinjoroj, UEA kaj EFE batalas. La rezulto estas eksterduba. Kion rezultis la batalo inter IKUE kaj IKA ? Ĝeneralan malfortiĝon. Ni rigardu : jen antaŭ ni estas dispartiĝo : SAT kaj SEU. Nia BES aprobu la reorganizon, sed restu neŭtrala, ĉar BES, nepaganta kotizon al KoRo, neniel estos subtenata de ICoKo kaj tial nia eventuala propono eĉ ne atingos la LoKoKon de la nunjara UKE... (kaj tiel ankoraŭ kvin minutojn)...

Cl.- Ni devas ĉesi ĉi tie tiun karikaturon de Julio Baghy. Se vi deziras ĝin ricevi en ĝia kompleto kaj samtempe konatiĝi kun nia gazeto *Svisa Espero*, petu ĝin skribante al Radio-Svislando.

A.- Tutcerte via grupo pli bone fartas. Tion ni esperas.

Karikaturo de Julio Baghy, el *Svisa Espero*, oktobro 1969
Claude Gacond, 327-a radioprelego, 1970.14.07 & 17

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-